Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO
kaj plio...
Estrara Subteamo: MOVADO

Estrara Komuniko EKO 2014-38 sendita el Budapeŝto la 21an de aŭgusto.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

## AMO en Ĉinio

Mi kontaktas vin ĉefe por senprokraste vidigi al vi la grupfoton el la Seminario pri Aktivula Maturigo okazanta nun en Ĉinio – sendube la plej granda ĝis nun. La foto troveblas en la alkroĉita PDF-dokumento, kune kun eta foto-albumo el la ĝisnunaj seminarioj. UEA gratulas al la organiza teamo! SMG nov 2015: Nun tiu PDF aperas fine de la nuna komunika teksto.

Aperis plie jena raporto pri la AMO-seminario sur la retejo de *El Popola Ĉinio*.
http://www.espero.com.cn/2014-08/20/content_33288616.htm

## Simpozio en Pollando

Antaŭ semajno ni komunikis la ĝojigan novaĵon, ke la trijara studprogramo en la Universitato Adam Mickiewicz havas sufiĉajn aliĝojn por ekruliĝi. Pormomente, ni rezignas doni al vi pri tio pliaj informoj. Tamen indas konigi al vi, ke okazos en la 25a kaj 26a de septembro la Tria Interlingvistika Simpozio en la Novfilologia Fako de la nomita universitato en Poznano. Ĝia temo estas 'Problemoj de internacia lingva komunuikado kaj iliaj solvoj'. Necesas emfazi du aferojn:

- la aliro al la simpozio estas malferma al ĉiu deziranto. La kursanoj en UAM – studintaj tra la antaŭaj tagoj – ja partoprenos la simpozion, sed ankaŭ publiko rajtas aldoniĝi. Eblas ankoraŭ proponi 30-minutan prezentaĵon.
- tuj post la simpozio en tuja proksimeco okazos la renoma kultura festivalo *Arkones*. Per unu vojaĝo eblas partopreni en du aranĝoj. Informojn vidu ĉe http://www.amu.edu.pl/~interl/

## Vizaĝo por la Konferenco de ILEI en Montevideo

La surloka motoro de tiu sukcesa evento, Sonja Risso, dissendis al la partoprenintoj la sekvan mesaĝon. Certe pliaj homoj volos rigardi la arigitajn fotojn, do mi plusendas la informojn:

> Karaj geamikoj partoprenintoj de la 47a konferenco de ILEI,
>
> Ni invitas vin eniri nian fejsbukan paĝon Esperanto-Uruguay:
> https://www.facebook.com/groups/ESPERANTOURUGUAY/
> kie ni kolektas fotojn kaj videojn de nia konferenco.
> Jam estas bela kvanto da ili, sed ankoraŭ ni volas multe pli.
> Bv. aldoni viajn fotojn kaj videojn, tiel ni havu la plej fidelan elmontron de nia evento!
>
> Ni vere dankas al vi ĉiuj pro via partopreno, pro kontribui al sukceso de la konferenco, kaj por havi la plezuron konatiĝi kun vi en nia urbo.
>
> Kisojn kaj Brakumojn, Sonja

Jen por nun, tuje pluen al AMO en Italio!

# JAM KVARFOJE AMO — EN TRE VARIAJ MONDPARTOJ!



AMO-1 en Horány, Hungario en marto, 2014.





Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
atestas ke

partoprenis trejnseminarion pri

**organizado de lokaj grupoj kaj teamgvidado**

gviditan de trejnistoj: Juliana Evandro, Anna Lobo de Carvalho, Veronika Poór, Olga Šilajeva kaj Rafael Henrique Zerbetto

okazinta dum la 70-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO kadre de la seminarioj AMO – Aktivula Maturiĝo

Fortalezo, 24-an de julio 2014

Supre: AMO-2 en Sidnejo, Kanado.

Dekstre: laborgrupo dum AMO-IJK en Fortaleza, Brazilo, kune kun specimeno de la atestilo pri partopreno (iniciato de TEJO, kiun UEA estonte sekvos).






AMO-3 nun okazanta en Siano, nordcentra Ĉinio. Rimarku la kvanton da partoprenintoj kaj la proporcion de junuloj!

Aperis jena raporto pri AMO-3 sur la retejo de *El Popola Ĉinio*.
http://www.espero.com.cn/2014-08/20/content_33288616.htm

## AMO – NIA PLUVIVIGILO!

Ne nur amo pluvivigas la homan specion, ĝi estas la vojo pluen por nia movado kaj lingva komunumo, kiu ja devas konscie krei siajn sekvajn generaciojn. Tro gravas la tasko por lasi tion al hazardo aŭ agemaj unuopuloj – UEA havas mision preni la gvidan rolon. Vi povas helpi nin!

Donaco al la asocio kun indiko 'por la AMO-progrAMO' estos uzata ekskluzive por stipendioj, kompenso al gvidantoj kaj por pluvivigi kaj kreskigi la programon – interalie zorgi, ke rezultoj aperu bonorde en la reto!

Momente, ni povas (modeste) subteni finance seson da seminarioj jare – por 2015 ni jam havas dezirojn el deko da urboj – denove el kvar kontinentoj. Per via helpo, ni povus akcepti pli ol ses seminariojn! Antaŭdankon!